

## **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2020-04-15 ĝis 2020-07-15.

### **Eventoj**

#### **Aktuale:**

#### **La unua virtuala kongreso VEKI**

Dum la lastaj tri monatoj la ĉefa zorgo en fokuso de la Estraro estis, certe, nia unua Virtuala Esperanto-Konferenco ILEI nomita VEKI. VEKI iĝis oficiala evento kadre de la Monda Festivalo-2020 de UEA. Survojis kaj survojas ĝis nun granda preparlaboro. Unue – longa kaj detala traktado kun E&I, kiu prizorgas platformon por multaj virtualaj eventoj ene de Esperantujo, unkluzive VEKI-n. ILEI kontraktis kun la firmao de Peter Baláz kaj serĉas solvon pripagi sian virtualan kunvenon. La kalkuloj de la kasisto post parta repago de la aliĝkotizoj por la ĉeesta kongreso en Kebekurbo ne ebligas pripagi la tutan oferton de E&I. Pro manko de sumo la Prezidantino Mireille Grosjean sendis alvokon-peton al UEA kaj ESF pri financaj garantioj. Kaze de realigo de financa helpo deflanke de UEA kaj ESF Mireille ankaŭ subtenos nian kongreson per la sama sumo.

**Grandan dankon iru al ili! La Estraro petas ankaŭ ĉiujn neindiferentajn membrojn kaj homojn subteni la unuan virtualan kongreson de la Instruista Ligo!**

Poste sekvis kaj sekvas ĝis nun multa traktado kaj organizado de diversaj programeroj. Tio estis kaj restas la plejparto de la estrara laboro.

Estis fiksitaj respondeculoj ene de la Estraro pri ĉiu Tago de la evento; la respondeculoj komunikis kun koncernaj personoj, pristudis alvenantajn proponojn. Survojas realigo de diversaj teknikaj kaj organizaj aferoj, ekzemple de aliĝilo. Estis elektita emblemo. La programo konstante modifiĝas pro aldono de novaj eroj.

Multe kontribuas al preparado de VEKI kromestraraj personoj: unuavice, nia ĉefredaktoro de IPR Jozefo Nemeth, kiu samtempe administras la paĝaron de ILEI. Elisabeth Le Dru el Francio prizorgas la Tagon pri Pedagogio, ĵaŭde la 30-an de julio. Estas preparata AMO-seminario kun podiaj diskutoj. Estas planata omaĝo al **Tago de ESPERANTO, la 26-an de Julio**.

Diversaj artistoj donos koncertojn kaj gajigos la etoson.

#### **Venontaj kongresoj**

Survojas preparlaboro por la kongreso 2021 en Edinburgo, Skotlando. Jam estas difinitaj la datoj, semajnon antaŭ UK, elektitaj la temo de la ĉefjara kunveno kaj eventuala kongresejo. Inter la Estraro kaj LKK estas diskutataj demandoj pri prezoj, loĝlokoj.

#### **La Estraro**

Dum majo-julio la Estraro ĉiujn du-semajnojn kunsidis rete por organizi sian ĉefkunvenon VEKI. Mireille Grosjean transdonas informojn al la estraro pri la laboroj kaj reciproke. Junie la Prezidantino Mireille Grosjean sendis salutmesaĝon omaĝe al la komenco de la trimonata Monda Festivalo.

#### **La Komitato**

Estas preparita por la reta komitatkunsido dum VEKI la tagordo, traktitaj diversaj demandoj rilate al reta realigo de la aranĝo. Estas ellaborita nova versio de Regularo pri reta voĉdono por aprobo de la Komitato.

#### **Projektoj**

Junie la Prezidantino Mireille Grosjean lanĉis gravan enketon pri uzado de la latina alfabeto en lernado de infanoj tra la mondo. La celo estas fari esploron pri disvastigo de la latina alfabeto, kiu estas baza alfabeto por Esperanto (kaj ankaŭ baza alfabeto por algebro kaj aliaj fremdaj lingvoj),

kaj transdoni tiun statistikon al UNESKO, se ĝi aspektas iom vastskala. Espereble tiu esploro kontribuos al agnosko de Esperanto .

### **Eldonado**

Daŭras preparlaboro por eldono de la Manlibro pri Instruado de Esperanto, giganta laboro en la manoj de Dr Katalin Kovats. Plie ILEI provas atingi finan presstadion por la Manlibro por lerni Esperanton en la suahila.

### **Internacia Pedagogia Revuo (IPR)**

**ILEI kore dankas al Sinjorino Luiza Carol pro ŝia multjara enorma kaj diligenta laboro kiel provleganto de IPR!** Kaj aŭdiaŭas ŝin. Daŭrigos la laboron la irana kolego Ahmad Reza Mamduhi. Ene de la Estraro komenciĝis diskuto pri atributado de specialaj indeksoj al sciencaj publikaĵoj en IPR. Tiu demando jam estis en fokuso de ILEI, tamen ne realiĝis ĝis la fino. Dum siaj retaj kunsidoj kaj per korespondado estraranoj kaj la redaktoro Jozefo Nemeth pritraktas diversajn manierojn fari tion.

### **Juna Amiko (JA)**

Maje post la debatoj kaj voĉdonado pri la budĝeto la Estraro decidis, ke la lasta, kvara numero de JA en 2020 estos disponigita nur rete. **ILEI kore dankas ĉiujn pro la kompreno kaj konsentoj kaj anoncas, ke, se iuj nepre volas havi paperan ekzempleron, tiuj devas persone komuniki kun la redaktoro ĝis la fino de aŭgusto.**

### **ILEI en la Reto**

La Estraro zorgas, ke retaj komunikkanaloj regule kaj diligente pleniĝu per novaj kaj freŝaj informoj pri la Ligo. La Prezidantino regule kaj abunde nutras per novaĵoj divesajn kanalojn de ILEI kaj ne nur: [www.ilei.info](http://www.ilei.info), facebook.com (du ILEI-paĝojn: <https://www.facebook.com/groups/115293975195238> kaj <https://www.facebook.com/groups/109522939206939>), kaj novan ĉefan kanalon Esperanto + Edukado ILEI ĉe Youtube. Aldoniĝas adreso ILEI ĉe Telegram. Informas pri la novaĵoj el ILEI ankaŭ la bulteno EKO kaj edukado.net.

### **Kunlaboro kun UEA**

Preparado de virtualaj eventoj, unuaj en la historio de Eo-movado, bone disvolviĝas en partnereco de la du organizoj. Ambaŭ sekvas preparadon unu de la alia. UEA strebas helpi siaflanke. ILEI pripensas kaj organizas sian partoprenon en Movada Foiro kaj Tago de Lernado dum la Virtuala Kongreso (VK) de UEA. Krome, ILEI partoprenos en gravaj eventoj de VK. *Revuo Esperanto*, kiel kutime, publikigas gravajn oficialajn anoncojn de ILEI, inkluzive pri VEKI.

### **Kontaktoj kun enmovadaj institucioj**

ILEI kunlaboras kun Katalin Kovats por prepari diversajn programerojn de VEKI. Kadre de la Tago de Lernado dum la Virtuala Kongreso de UEA la programo estas starigita de Marija Belosevic, kiel kutime. La Prezidantino Mireille Grosjean ĉe edukado.net lanĉis enketon-esploron pri Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Ĉiuj dezirantoj bonvenos! La celo de tiu laboro estas konigi la Homajn Rajtojn kaj celebri la 75-an datrevenon de la fondo de Unuiĝintaj Nacioj. La prezidanto Mireille Grosjean sendis salutmesaĝon al TEJO por la komenco de IJK, al E@I por la komenco de SES kaj al UMEA por la komenco de ĝia Kongreso.

### **Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn!